

Eŭropa Bulteno

Februaro 2013, Numero 124

NIAJ LANDAJ ASOCIOJ ESPERANTO EN ESTONIO



Esperanto atingis Estonion baldaŭ post la apero. Kiel la unua esperantisto, jam en 1891 lernis E-on Jaan Tenisson, antaŭa volapukisto. La unua E-kurso por estonoj aperis en la gazeto "Postimees" ("Poŝtisto"). En la komenco de la 20-a jarcento aperis jam kelkaj lernolibroj. Dum pli ol dek jaroj la movado restis nur lernado kaj renkontiĝoj de unuopuloj el malvasta rondo de tiutempa estona intelektularo. La unua publika kurso de Esperanto okazis en 1907. En la sama jaro oni sukcesis ricevi permeson por fondi la unuan oficialan E-organizaĵon Revela Esperantista Grupo. Ĉe la lulilo de la grupo estis kelkaj verkemuloj, aktivuloj kiuj restis longe gvidantoj de la movado. Ekde 1908 oni komencis eldoni revueton "Estlanda Esperantisto".

La pasinta jarcento ne estis por Esperanto senhalta antaŭeniĝo. Tion bremsis du tuthomaraj

katastrofoj - la du mondmilitoj, politikaj malpermesoj, ekonomiaj depresioj, interhomaj misrilatoj. Tamen la nobla ideo ne pereis, ĝi progresis kaj evoluis. Ne estas multaj movadoj travivantaj pli ol jarcenton kaj restantaj vivkapablaj spite al ĉiuj malfacilaĵoj. La plej vigla agado en Estonio okazis en 70-aj kaj 80-aj jaroj de la pasinta jarcento. Ĉiujare aperis tradukoj de niaj klasikuloj, Esperanto estis en kelkaj mezlernejoj kiel fakultativa lernobjekto. Tiama estona klerigministro Ferdinand Eisen estis esperantisto kaj favoris nian agadon. Bona ekzemplo pri fruktodona agado estas Tartua Esperanto Societo kun ĝia gvidanto Madis Linnamägi. Li agadis en akademiaj rondoj ĉe la Tartua universitato kaj samtempe organizis somerajn renkontiĝojn por lernantoj. En Tallinn nia plej eminenta movadano tra jardekoj estis Jaan Ojlo.

En la 90-aj komencis denove stagnado, jam la trian fojon. Okazintaĵoj de la komenco de 90-aj jaroj, transiro al la merkatekonomio venigis okcidentan kapitalon. Sed ĝi neniam venas sola, ĝi kunportas sian lingvon, amaskulturon kaj senlaborecon. La angla lingvo tuj okupis



Madis Linnamägi

gvidlokon en la klerigsistemo, negoco kaj en ĉiuj vivofakoj. Ĝi okupas la ĉefan lokon surstrate, superante la lokan nacian lingvon. Kono de la angla donas esperon ricevi laboron bonokaze ekster la hejmlando. Esperanto ne donas monon, ĝia praktika uzado dume nur postulas elspezojn, ĉu aĉetado de libroj, veturo al renkontiĝoj, kongresoj. Sed esperantistoj neniam kaj nenie apartenis al ekonomiaj prosperuloj, ili estis kaj estas simplaj oficistoj, kleruloj kun malaltaj enspezoj. Estas malfacile reklami lernadon de Esperanto sen ĝia praktika uzado. Kelkfoje oni demandis per kio ni pravigu daŭrigon de la agado en niaj malgrandaj kluboj kaj rondoj, se la nura nobla ideo pri frateco, egaleco kaj demokratio neniom valoras?

Novan evoluetaĵon montris aperoj de grandaj vortaroj E-naciaj kaj nacia-esperantaj en la komenco de la 21-a jarcento. Ni kredas, ke la interreto havas pozitivan influon al niaj agadoj. Ni sukcesis konservi tradicion de someraj Baltiaj Esperanto Tagoj, kion laŭvice organizas Litovio, Latvio kaj Estonio. Ĉijare okazas BET – 49 en Litovio. Parolante pri la nuna situacio ni devas bedaŭrinde denove uzi la vorton stagnado. Jam dum kelkaj jaroj ne okazas E-kursoj por plenkreskuloj, pro kio la vicoj de esperantistoj ne kreskas, sed malkreskas pro maljuniĝo. La kvanto de konsciaj esperantistoj preskaŭ falis al la nivelo de la iama Revela Esperantista Grupo. Unuopaj lernantoj ne donis alkreskon al la organizita movado. Estas fakto, ke la tekniko evoluas pli rapide ol intelekta kulturo de la homaro. La mondon regas grandaj potenculoj kun sia lingvopolitiko kontraŭ kio estas apenaŭ iom konkurenckapabla paca kaj demokratia ideo de Esperanto. Kaŭzoj de la krizo ne kaŝiĝas en la internacia lingvo, sed ekster ĝi. Ni ne estus veraj esperantistoj, se ni ne vidus post tiu ĉi pesimisma fono ankaŭ ion esperigan. En tiuj kondiĉoj la estona Esperanto-movado apogas sin al la internacia movado, al

ties sukcesoj kaj progreso. Evoluo estas tajdosimila: sukceson ofte sekvas stagno aŭ eĉ malsukceso, kiun siavice sekvas sukceso. Misrikolton en unu regiono povas paraleli rikoltabundo en alia regiono. Tamen ni esperu, ke la tempo subtenas Esperanton. Ne konvenas paroli pri misrikolto. Ni fosu nian kampon, semu nian semon.

Tõnu Hirsik, Estona Esperanto Asocio

KUNVENO KUN MINISTRO DE EDUKADO DE SLOVAKIO

Jozef Reinart de Ministerio de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovakio kun Petro Baláž de Edukado@Interreto havis la 8-an de februaro unuhoran kunsidon kun Dušan Čaplovič, Ministro de edukado, scienco, esploro kaj sporto de Slovakio kaj Vladimír Belovič, ĝenerala direktoro de Sekcio de internaciaj rilatoj kaj tutviva lernado.

Ni informis la ministron nome de EEU kaj E@I, kiuj estas membroj de la Civitana Socia Platformo de EU por Multlingvismo (CSPM), pri plenkunsido de la CSPM en decembro 2012, kiu diskutis pri raporto/komunikaĵo de Europa Komisiono al membro-ŝtatoj kaj institucioj de EU.



La ministro komprenis niajn argumentojn, ke estas urĝe bezonate ŝanĝi kaj efektiviĝi lingvan instruadon en elementaj lernejoj precipe en unuaj du jaroj, ĉar infanoj estas tro okupitaj precipe pro ĉiutaga instruado de fremda lingvo kaj ne restas tempo por bone instrui gepatran lingvon kaj aliajn edukajn objektojn gravajn por ĝenerala evoluo

de infana personeco. Frua komenco de instruado de fremda lingvo ekde la unua klaso aŭ jam eĉ ekde infanĝardeno ne alportas atendatan rezulton.

Estis interkonsentite, ke en februaro okazos nia kunsido kun kompetentuloj kaj fakuloj de edukado en elementaj kaj mezaj lernejoj de la ministerio kaj aliaj edukaj institucioj. Ni havos eblecon informi ilin pri CSPM kaj rekomendita plej bona ekzemplo de lingvoinstruado, nova projekto 'Lingvolanĉilo' (S2L), kiu utiligas gramatikon de Esperanto kaj 500 plej ofte uzatajn radikojn, kiu efektiviĝas en Britio ekde 2006 en 4 elementaj lernejoj kun tre bonaj rezultoj.

Proponita estos ĝia eksperimenta efektivigo en Slovakio kaj preparo de S2L projekto, en kiu partoprenus pluraj EU landoj. Tiun projekton povos CSPM prezenti al EK por financado, kiel estis Poliglotti4.eu en 2011-2012.

Se estus dum la februara kunsido akirita ĝenerala interkonsento efektivigi eksperimenton pri S2L en Slovakio, ni rekomendis al la ministro, ke li proponu al ministroj de Viŝegradaj landoj (V4) efektivigi tiun ĉi projekton en ĉiuj landoj de la regiono de V4 (Ĉeĥio, Pollando, Hungario kaj Slovakio) en elementaj lernejoj kaj kun aliaj landoj de EU. Ni rekomendis al li, ke estus bone inviti al la projekto Kroation, kiel novan membron de EU. La ministro subtenos tiun ĉi proponon.



Krom tio ni informis lin pri aktuala stato kaj planoj de evoluo de la modela multlingva portalo de EU 'Slovae.eu' (aldonado de lingvoj kaj plialtigo de lingva nivelo de A1-A2 al B1-B2 por prezenti la plenfunkciantan portalon dum la Prezidanteco de Slovakio en EU en la dua duono de 2016 pri la lando kaj agadoj dum la prezidanteco, kiel modelon de plurlingva informado ankaŭ al civitanoj en iliaj lingvoj. Por tiuj homoj, kiuj havas intereson studi la slovakon, ke ili povu studi ĝin en propraj gepatraj lingvoj. Li promesis, ke li serĉos eblecon malgraŭ la nuna malfacila financa kaj ekonomia krizo, kiel lia ministerio povus helpi evoluigi tiun ĉi modelan multlingvan portalon.

Ni donacis al la ministro ankaŭ lernolibron de Stano Marček 'Esperanto per rekta metodo' en la slovakaj kaj informis lin, ke ĝi estis eldonita jam en pli ol 30 lingvoj kaj se estos pli taŭga situacio kaj Esperanto estos pli konata/akceptata en Slovakio, povus esti utiligita en pli altaj klasoj de elementa lernejo aŭ/kaj en mezlernejoj.

Ni petis lin dum la februara kunsido de la Konsilio de ministroj de edukado en Bruselo rekomendi en lia diskutkontribuo, ke EK pli reflektu rekomendojn de CSPM de junio 2011 por plibonigo de lingvo-instruado en siaj raportoj, ke ili estu pli konataj al 27 EU membro-landoj. Ni trandonis al la ministro pozicion de CSPM al la raporto de EK 'Repenso de Edukado', el kiu li povos ĉerpi ideojn de civitanaj proponoj, kiel povus esti plibonigita lingva instruado kaj kompetencoj de civitanoj.

Dušan Čaplovič, ministro de edukado, scienco, esploro kaj sporto de Slovakio estis malfermita al novigaj civitanaj proponoj. La kunsido estis fruktodona, fine de kiu estis interkonsentita plua paŝo, dum kiu ni havos eblecon informi pri la noviga eksperimento S2L kompetentulojn kaj fakulojn de edukado en elementaj kaj mezaj lernejoj kaj diskuti kun ili ĝian eblan efektivigon en Slovakio kun la celo plibonigi lingvo-instruadon.

Jozef Reinbart kaj Peter Baláž

RAPORTO PRI LA AGADO DE EEU EN 2012



Estraranoj de EEU kaj loka triesta organizanto dum la Triesta konferenco kun eksprezidantoj de Kroatio kaj Slovenio

Ekstera Agado

Eŭropa Komisiono decidis plilongigi la mandaton por la Platformo por multlingveco en kiu aktivis 29 eŭroprnivelaĵoj neregistaraj organizoj al pliaj du jaroj (2012-2014) kaj kompletigi ĝin per kelkaj novaj eŭroprnivelaĵoj civitanaĵoj organizoj kaj tiel baze de la propono de EEU fariĝis plia membro la esperantista organizaĵo E@I pro kio nun en la Platformo aktivis kvar esperantistoj. La Platformo havis jam du kunsidojn en 2012. Pro tiu aktiveco Jozef Reinart kaj Petro Baláž sukcesis havi kelkajn gravajn kontaktojn kun la slovakaj funkciuloj en Eŭropa Komisiono kaj en sia lando kio kondukis al novaj gravaj iniciatoj realigitaj en la sekvaj jaroj.



Alia gravega atingo estis nova ricevo de eŭropa subvencio por la projekto Lingvo.info kiun EEU kunordigas kaj kune kun 8 aliaj partneroj devas realigi dum 2013 kaj 2014. La laboro jam komenciĝis kaj en decembro okazis la unua konferenco de partneroj en Bratislavo, kie nome de EEU partoprenis Nikola Rašić kaj Maja Tišljar. La projekto estas la plej granda aktiveco el financa vidpunkto ĝis nun,

ĉar por ĝi EU aprobis budĝeton de 530.000 eŭroj el kio 400.000 pagas EU. Pri la detaloj legeblas en Eŭropa Bulteno (novembro kaj decembro) kaj ni raportos regule en la sekvaj du jaroj pri la realigo kaj evoluo de la projekto. Krome informoj troveblas en la retpaĝo

<http://lingvo.info/eo/> kaj en la projekta Facebook paĝo
<https://www.facebook.com/lingvo.info>.

EEU transdonis la 1-an de aprilo proponon por la tutpopola iniciato al Eŭropa Komisiono ke la eŭropanoj esprimu sian subtenon al nia ideo kanti eŭropan himnon en Esperanto laŭ la teksto de Umberto Broccatelli. Bedaŭrinde la oficejo de Eŭropa Komisiono kiu devas aprobi la iniciaton malakceptis ĝin klarigante tion per tio ke Esperanto ne estas kultura heredaĵo de iu ajn eŭropunia lando. La estraro poste konsultiĝis kun pluraj advokatoj kiuj rekomendas ke ni plendu al eŭropa ombudsmano, kion ni faros en 2013. Montriĝis poste ke la politikaj funkciuloj en EK estis misinformitaj de la oficejo ke temas pri propono enkonduki Esperanton kaj ne ke temas nur pri Eŭropa himno. Intertempe ni kolektis aron da deklaroj ke ja Esperanto estas kulturheredaĵo de Eŭropo, kiel la deklaroj de irlanda ŝtatprezidento, irlanda ministrino pri eksteraj aferoj, pola senatano k.a.

Maja kaj Zlatko Tišljar ellaboris aron da pliaj projektoj por la eŭropa financado. Por la aktiva civitaneco unu projekton, unu por Grundtvig, unu por KA-2 kaj unu projekton por konkurso de Viŝegradaj landoj.

La membroj de la estraro, sed ankaŭ aliaj aktivuloj kaj assembleaj membroj partoprenis en aro da neesperantistaj politikaj, sciencaj kaj interesorganizaj konferencoj kaj aranĝoj diverstipaj. Interalie elstaras kvalita aktiva partopreno en la Ekonomia Forumo en pola Krynica en kiu refoje estis organizita tre videbla stando de EEU, apud kiu pasadis dum la 3 tagoj (4-6. sept) pli ol 2500 partoprenintaj forumanoj inter kiuj ŝtatestroj, gravaj politikistoj, ekonomikistoj, bankistoj kaj pli ol 500 ĵurnalistoj. EEU organizis ankaŭ diskutpanelon pri la temo „Kulturo, ĉu ankaŭ eŭropa aŭ nur nacia?” en kiu prelegis Ilona Koutny, Zbigniew Galor, Jozef Reinart kaj Petro Balaž. Kune kun polaj esperantistoj gvidataj de Halina Komar ili partoprenis ankaŭ en aliaj aranĝoj de la Forumo.

La estraranoj de EEU partoprenis en

1. Kunveno en Antverpeno la 5-an de febr. en kiu partoprenis ankaŭ prezidanto de EU Herman Van Rompuy. Partoprenis Flory Witdoeckt (kiu kantis ankaŭ eŭropan himnon en E) kaj Seán Ó Riain.
2. Konferenco de Eŭropa Komisiono „Renkonte al eŭropa fondaĵo de Nova Eŭropa Financa Ordo” en Bruselo en junio. Partoprenis Flory Witdoeckt
3. Konferenco de EK en Limasol (Kipro) „Multlingvismo en Eŭropo” 26-28. de sept. Partoprenis Seán Ó Riain kaj Jozef Reinart.
4. Konstanta Konferenco de slovakoj vivantaj en eksterlando en Bratislavo la 30-an de okt. Partoprenis Jozef Reinart kaj Petro Balaž
5. Fina konferenco de la interuniversitata projekto pri Multlingvismo en EU EUNOM okazinta en novembro en Bruselo. Partoprenis Kristin Tytgat kaj Flory Witdoeckt.
6. Interparolo de Jozef Reinart kun vicprezidanto de Eŭropa Komisiono Maraš Šefkovič

En Esperantistaj aranĝoj de Landaj Asocioj partoprenis:

1. German-dana-pola kongreso (Seán Ó Riain)

2. Brita E-kongreso: Seán Ó Riain
3. Malferma Tago de UEA en Rotterdamo (28an de aprilo) Seán Ó Riain kaj Flory Witdoeck
4. KAEST – Konferenco pri apliko de Esperanto en sciencoj en Modra (Slovakio): Zlatko Tišljár, Jozef Reinart kaj Petro Baláž

Gravaj atingoj por Esperanto en Eŭropo en kiuj EEU ne rekte partoprenis:

- Gravan eŭropan agadon realigis hungaroj. Kreiĝis portalo kiu regule informas en Esperanto pri Eŭropaj novaĵoj Eŭropa Civitano. Oni povas legi ĝin ĉe www.europacivitano.worldpress.com kaj ĝi aperis dum 2012 pli ol 200 fojojn.
- En Pollando la agado de pola EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) kun la helpo de Etsuo Myjoshi atingis ke la pola parlamento organizis feston okaze de 125 jaroj de Esperanto la 17-an de novembro kaj post tiu ĉi festo fondiĝis parlamenta grupo por Esperanto kiun gvidas pola senatano prof. Edmund Wittbrodt. Similan feston pri la 125-jaroj de E sukcesis instigi esperantistoj en Brita parlamento kiu okazis en julio.
- La papo Benedikto la XVIa kiel ĉiujare turnis sin dum siaj paska kaj kristnaska paroladoj al la mondo ankaŭ en Esperanto. Italaj esperantistoj eluzis la okazon reklami Esperanton sur la placo en Vatikano
- Okaze de Eŭropa Tago de Lingvoj esperanto-asocioj organizis aranĝojn en 8 eŭropaj landoj kiuj estis listigitaj en aparta listo de Konsilio de Eŭropo.
- La honora membro de EEU Etsuo Myjoshi starigis fondaĵon CIGNO kiu premias unu landan asocion kiu sukcesis atingi plej multajn sukcesojn en la informado pri Esperanto ekster la movado. En 2012 estis transdonita la unuan fojon la premio al Brita E-Asocio.
- Grava ekstera atingo en la jaro 2012, kvankam sen rilato kun EEU, estis la enkonduko de Esperanto inter la 64 lingvoj al kaj de kiuj eblas aŭtomata tradukado ĉe la tradukilo de Google.
- Speciale interesa fenomeno en kiu parte partoprenas EEU sed ankaŭ stimulas ĉiujn aliajn E-organizaĵojn estas ĉiam pli granda nombro da projektoj financataj de EU kiujn ellaboris kaj projektis E-organizaĵoj aŭ al E-ligitaj entreprenoj. En 2012 nur E@I ricevis tri novajn projektojn, en kies ellaboro grave kunlaboris EEU. EEU ricevis unu novan projekton kaj en Comenius du E-projektoj de kunlaboro de lernejoj en kiuj oni lernas E-on estis akceptitaj. Krome unu Grundvig-projekto. Por ĉiuj kune EU disponigis pli ol milionon da eŭroj.

LA JARO DE TIBOR SEKELJ

La jaron 2012 EEU proklamis La Jaro de Tibor Sekelj. Tiu aktivado estis tre sukcesa ĉar pro tio okazis trideko da diversaj aranĝoj ligitaj al tiu grava esperantisto, mondesploristo kaj verkisto. Aperis du novaj libroj: la romaneto Kumeŭaŭa - filo de ĝangalo en la korea kaj nederlanda lingvoj, tradukoj estis faritaj por la franca kaj la angla kiuj supozeble aperos en 2013, okazis pluraj ekspozicioj inter kiuj 3 estis grandaj: en la muzeo de Senta (Serbio) kaj Etnografia muzeo de Zagrebo, kie troviĝas objektoj donacitaj de Sekelj kaj en la muzeo se Subotica. Okazis konferencoj dediĉitaj al li en Subotica (Serbio) kaj Hraščina (Kroatio) kaj multaj forumoj kaj prelegoj dediĉitaj al li en Germanio, Francio, Nederlando, Hungario,



Slovakio, Slovenio, Serbio, Kroatio, Bosnio/Hercegovino. Krom en Eŭropo okazis omaĝoj al li en Nepalo, Argentino, Vjetnamio, Koreio kaj Ĉinio. Krome aperis granda artikolo pri Tibor Sekelj en esperanta vikipedio kiu iĝis referencartikolo por tradukoj al aliaj vikipediaj artikoloj. Pro tio nove aperis artikoloj en la kroata kaj slovena vikipedioj kaj kelkaj aliaj pligrandiĝis pro la infomroj en la esperanta. La agado ne finiĝis en

2012, ĉar aro da aferoj estas antaŭviditaj ankaŭ en 2013 kiam estas 25-jariĝo de la morto de Tibor Sekelj.

Nome de EEU la agadon kunordigis kaj spronis Zlatko Tišljarić, kiu mem prelegis en la konferencoj en Subotica (Sr) kaj Hrašćina (Hr), en publikaj forumoj en Banja Luka (BkH), Bratislava (Sk) kaj en Maribor (Slovenio).

Eŭropa Konferenco en Triesto, 9-11. de majo 2012



La plej grava aranĝo de EEU en 2013 estis la Eŭropa Konferenco „Kia estus la nuna Eŭropo sen EU?” en Triesto (Italio) inter la 9-a kaj 11-a de majo. Tio estis centra aranĝo de la samnoma projekto por kiu EEU ricevis monon de EU-fondaĵo por aktiva civitaneco. Kunlabore kun Triesta

E-Asocio estis organizita verŝajne la plej sukcesa konferenco kiun esperantistoj organizis je iu neesperanta temo en kiu partoprenis aro da gravaj eŭropaj politikistoj, inter kiuj du eksprezidantoj de ŝtatoj, unu ekministro de eksteraj aferoj kaj 6 nunaj kaj eksaj eŭropaj kaj naciaj parlamentanoj. En la konferenco oni uzis tri laborlingvojn (Esperanto, itala kaj la angla) al kaj de kiuj oni ĉion simultane interpretis. Esperanto sukcesis en tio bonege pro la laboro de bonegaj interpretistoj kiujn gvidis Nikola Rašić. La konferenco estis turnita al junaj ĵurnalistoj kaj studentoj de ĵurnalismo el 6 eŭropaj landoj. Detale pri tio eblas legi en la maja numero de Eŭropa Bulteno. Gravus aldoni ke la konferenco provokis esceptan intereson de la informrimedoj en Italio kaj Slovenio kiuj aperigis dekon da intervjuoj en la tutlandaj televidaj

programoj kaj deko da artikoloj aperis en triestaj kaj slovenaj gazetoj. En 2013 aperos ankaŭ referaĵkolekto kun ĉiuj referaĵoj de la konferenco en Esperanto kaj en unu el naciaj lingvoj.

9-a EEU-Kongreso, Irlando, 16-20-a de julio 2012

Dua plej grava aranĝo de EEU en 2012 estis la 9-a kongreso de EEU okazinta en Irlanda urbo Galivo, de la 16-a ĝis la 20-a de julio 2012. La kongresa temo estis **Lingvolernado en EU: lerni pli, kosti malpli**". Partoprenis 157 esperantistoj el 28 landoj. La unuan fojon la kongreson organizis ne LKK sed aparta neesperantista urba entrepreno por aranĝoj kune kun Maja Tišljar kaj Seán Ó Riain. La kongreso estis sukcese kaj bone organizita kun multaj kulturaj kaj ekskursaj elementoj, sed aparte gravaj estis 11 prelegoj pri la kongresa temo inter kiuj eĉ 3 irlandaj neesperantistaj fakuloj prelegis, legante la prelegojn en Esperanto. La kongreson aŭspiciis la irlandia ŝtata prezidento Michael D. O hUiginn kiu sendis apartan mesaĝon kaj la mesaĝon sendis ankaŭ ekstera ministrino de la irlandia registaro. Apartan meriton havis bonega organizo de informado eksteren. Seán Ó Riain havis 11 intervjuojn por ĉiuj gravaj televido kaj radioj en Irlando kaj aperis deko da artikoloj en pluraj gazetoj.



Detalojn vi povas legi en juli-aŭgusta numero de Eŭropa Bulteno. Maja Tišljar ellaboris tre bonan ttt-paĝaron por la kongreso.

Enmovada Agado

Ni organizis la kunsidon de la asembleo de EEU dum la EEU-kongreso en Galivo la 18-an kaj 19-an de julio, kiu okupiĝis pri la administraj tagordaj punktoj kaj planoj por la estonto. Kunsidis ankaŭ la estraro kiu interalie decidis pri la loko de la sekva EEU-kongreso en Nitra, Slovakio. Malferman kunsidon de la asembleo por ĉiuj interesitoj ĉeestis cento da kongresanoj kaj dum la ferma kunveno oni akceptis konkludojn de la kongrestema konferenco.

La Eŭropa Bulteno regule aperis 11 fojojn (julia-aŭgusta numero estis komuna) ĉiu je 12-18 paĝoj. Ĝin ni publikigis en la paĝaro de EEU www.europo.eu kaj en www.gazetejo.org kie oni povas konsulti ĉiujn numerojn. Redaktis ĝin la sekretario kaj teknike aranĝis Maja Tiŝljar. Aparte necesas substreki ke en granda plimulto de la bultenoj aperis artikolo pri unu landa asocio tiel ke por 2013 restis nur tri lastaj artikoloj. Baze de tiu preskaŭ tri-jara serio de artikoloj ni sukcesos kolekti superrigardon super la E-movadoj en ĉiuj 27 landoj de EU. La kunlaboro kun UEA estis bona kiel kutime: Niaj reprezentantoj ĉeestis en kelkaj aranĝoj de UEA (malfermaj tagoj de UEA, en la komitatkunsidoj kaj komisionoj de UK en Hanojo) kaj kunorganizis kun UEA (kiu helpis finance) la partoprenon en Eŭropa Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando), kaj EEU subtenis la agadon de UEA pri festi 125-jariĝon de Esperanto. UEA fondis en 2012 sian eŭropan komisionon en kiu membras ankaŭ Sean O Riain kaj Zlatko Tiŝljar kiuj aktive partoprenas konstante en ĝia laboro. Ni ankaŭ sendis necesajn informojn por la jarraporto de UEA.

La **landa agado** estis kontentiga, kvankam ni ankoraŭ ne sukcesis kunlaborigi kelkajn landajn asociojn. Lamis la kontaktado kun Estonio, Litovio, Finnlando kaj Portugalio, sed tamen fine ĉiuj reagis almenaŭ minimume kadre de la plej necesa kunlaboro. La centra problemo estas ke deko da asocioj ne pagas jam dum pluraj jaroj siajn kotizojn kaj ni ne sukcesas konvinki ilin pri nepreco de tiu tasko. La plej bona novaĵo estas ke fine de la jaro oni anoncis ke en 2013 estos gvidata la unua E-kurso en Kipro, la nura lando de EU kiu ĝis nun havis neniun E-agadon. La problema iĝis pola E-asocio kiu en 2012 definitive disfalis kaj necesos refondi ĝin. Kvankam en Pollando plu estas multloke bonega E-agado, la Asocio mem estas en granda krizo.

Bona kunlaboro pludaŭris kun Germana E-Asocio, kiu plu administras minimuman salajron de nia direktorino Maja Tiŝljar. Kompreneble, ke escepte bonan kunlaboron ni havis kun irlandaj esperantistoj kiuj relative amase partoprenis en la EEU-kongreso kaj zorgis pri multaj organizaj aspektoj de la kongreso. Klare ke bonega kunlaboro estis ankaŭ kun Itala E-federacio, aparte kun Triesta E-Asocio.

Krome ni realigis preskaŭ ĉiujn punktojn de nia laborplano por 2012:



- Maja prizorgis la repaĝaron de EEU kaj kiu ankaŭ kreis kaj zorgis pri la nova paĝaro de la Galiva kongreso. Ŝi kaj la sekretario organizis preparlaborojn por la Triesta konferenco kaj realigis la kongerencon mem.
- Ankaŭ la tuta administrado (prizorgo de dokumentaro, ellaboro de novaj projektoj kaj raportoj, prizorgo de financoj estis plene plenumita kion prizorgis Maja Tiŝljar kaj Flory Witdoeckt.
- Maja Tiŝljar partoprenis en kelkaj kunvenoj de EU-organoj rilate financadon de neregistaraj organizoj kaj en laboro de la Platformo pri multlingvismo.

La informa agado estis en 2012 pli ol kutima. Seán Ó Riain havis komence de la jaro intervjuon por germana radio ARD kaj en majo antervjuon por la eŭropa ARTE-televido. Dum la galiva kongreso li estis daŭre intervjuata kaj aperis 11 raportaĵoj en irlanda televideo, radio kaj same tiom da artikoloj en la gazetaro. Ankaŭ dum la Triesta konferenco svarmis televidoj de Italio (RAI) kaj Slovenio (RTV SLO). Aperis entute trideko da televidaj kaj radio-informoj nacilingvaj kaj same tiom da gazetaraj artikoloj. Zlatko Tišljar estis



partoprenanto en 1-hora televida programo de loka TV-stacio de slovena Maribor okaze de la Tibor Sekelj-jaro. Kiuj landaj asocioj tiukampe estis plej aktivaj montros la

premio Cigno en 2013.

Financoj

La kotizpagado en 2012 okazis iom pli bone ol en 2011. Pagis la kotizojn 16 LAoj (Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥio, Danlando, Finnlando, Germanio, Irlando, Slovakio, Slovenio, Svedio, Bulgario, Francio, Grekio, Italio, Latvio, Nederlando). Ne pagis la jenaj LAoj: Grandbritio, Hispanio, Estonio, Litovio, Pollando, Portugalio, Rumanio, Luksemburgio kaj Malto. En 2011 pagis 13 landaj asocioj.

La jaro finance estis esence pli bona ol la antaŭa, ĉar ni ricevis unuan parton de la nove aprobita projekto (Lingvo.info). La kongreso en Galivo finiĝis sen profito kaj sen gajno pro neantavideble malmulta nombro da partoprenantoj. La direktorino daŭre zorgas pri ellaboro de novaj projektoj kaj partopreno en pluraj konkursoj. Tial ni sufiĉe certas ke la financa stato ankaŭ en la sekva jaro estos bona, sed necesas aldoni ke estos granda defio por EEU prizorgi la proprajn 25% por financi la projekton lingvo.info dum la sekvaj du jaroj.

Flory Witdoeckt ellaboris la financon raporton por la financaj instancoj de Belgio por 2011 kaj por la asembleo en Galivo.

Ni sukcesis pluteni en tre minimuma formo la profesion laboron de Maja Tišljar (kiu pretis fari sian laboron kontraŭ minimume permesitaj pagoj per kiuj eblas formale esti registrita kiel salajrata persono en Germanio). Tio gravis, ĉar la kondiĉo por ricevi konstantan financadon estas ke la asocio jam havas almenaŭ unu profesiulon kaj la amplekso de laboroj ĉiam pli vastiĝas.

Zlatko Tišljar, sekretario de EEU, februaro 2013.

KUNSIDO DE LA PARLAMENTA GRUPO APOGANTA ESPERANTON

La 19-an de februaro 2013 konstituiĝis parlamenta grupo apoganta Esperanton en la Pola Sejmo (parlamento), kiun prezidas la pola senatano prof. d-ro Edmund Wittbrodt. Dum la kunsido oni akceptis la jenajn taskojn por la grupo:

1. Informo pri formala kreiĝo de la Parlamenta Grupo, elekto de la estraro kaj akcepto de regularo.
2. Informo pri akcepto, far Senata Prezidantaro, de sciigo pri kreiĝo de la Parlamenta Grupo Apoganta Esperanton.
3. Postulata agadplano por la kuranta jaro:



- renkonto kun reprezentantoj de la Pola Asocio Eŭropo-Demokratio-Esperanto kun la celo difini iliajn dezirojn, kampojn de kunlaboro kaj helpeblecojn flanke de la Parlamenta Grupo.
- renkonto kun la direktoro de la Ambasadato de Eŭropa Komisiono por Pollando, sinjorino Ewa Synowiec kaj preparolo de eblecoj kunorganizi en la Ambasadato simpozion dediĉitan al Esperanto (ekz. en majo, proksime al dato de solena celebrado de Tago de Eŭropo).
- renkonto kun la Ministro pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo por interkonsenti eblecojn enskribi Esperanton sur Landan Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo.
- diagnozado pri eblecoj enkonduki Esperanton pere de edukado (ŝancoj, kampoj, rimedoj) – interkonsente kun la Ministerio pri Edukado (flanke de la Apoganta Grupo – ekorganizado de konkurso por lernejoj, dediĉita samtempe al Esperanto kaj ĝia Kreinto).
- disvastigo de la lingvo Esperanto – renkontoj kun la membroj de Eŭropa Parlamento, ebleco organizi en la Eŭropa Parlamento ekspozicion „125 jaroj de Esperanto”, kiu estis inaŭgurita oktobre 2012 en Pola Senatejo.

Edward Kozyra

GUGLO DONAS STIPENDIOJN

Ĉiujare (kaj verŝajne denove en 2013) Guglo donas stipendiojn, por ke studentoj evoluigu liberan kaj malfermitkodon programaron dum la somero. Enkadre de tio, ĉiujare deko da studentoj kunlaboras kun Apertium por evoluigi aŭtomatajn tradukilojn, inkluzive tradukilojn el kaj al Esperanto.

Temas pri ĉ. 5000 USD por laboro ĉefe inter majo kaj aŭgusto. En tiu periodo la studentoj laboros 20-30 horojn semajne sub la gvido de spertulo. Studento estas ĉiu kiu enskribiĝis en universitata aŭ altlerneja institucio kaj havas 18 jarojn aŭ pli. La studata fako ne estas aparte grava (kaj en Apertium ni havis sufiĉe diversajn studentojn) kaj ankaŭ post-gradaj studentoj (ekz. doktoriĝantoj) povas partopreni.

Se ĉio okazas kiel en la pasintaj jaroj, la kandidatoj devos prezenti siajn projektojn komence de marto al Apertium-komisiono, kiu elektos dekon el ili. Krom tio, dum aprilo kaj majo ili devas pli bone konatiĝi kun la uzotaj iloj (tiuokaze kun la Apertium-programaro). Anglalingvajn informojn pri la pasintjaraj Apertium-projektoj stipendiitaj de Guglo eblas legi ĉe: http://wiki.apertium.org/wiki/Google_Summer_of_Code/Application_2012 Kaj pri la Guglo-stipendioj, ĉi tie: <http://code.google.com/p/google-summer-of-code/wiki/AdviceforStudents>

La evoluigo de aŭtomata tradukilo inter du lingvoj por Apertium daŭras ĉirkaŭ 2-3 monatojn. Esence tio konsistas el: 1) kreado de dulingva vortaro surbaze de ekzistanta libere uzebla elektronika vortaro; 2) difino de la morfologio de la koncerna lingvo, se ĝi ankoraŭ ne estas difinita en Apertium (t.e. necesas klarigi, kiaj estas ĉiuj formoj de la vortoj: nombro, genro, kazo, konjugacio k.s.); 3) kreado de sinsekvo da reguloj, permesantaj ŝanĝi strukturojn de la lingvo, de kiu oni tradukas, al tiuj de la lingvo, al kiu oni tradukas (por ne havi krudan laŭvortan tradukon, donatan de la unuaj du paŝoj). Pli detala klarigo en Esperanto de la farena laboro legeblas ĉe <http://www.teleskopo.com/Plena-dosiero-2011.pdf> (p. 5-19). Bonvenaj estas proponoj de tradukiloj el kaj al malpli uzataj lingvoj, ne ĝuantaj grandan komputilan subtenon (ekz. la bretona, la kurda aŭ la tataro). Ekzemple, danke al la pasintjaraj stipendioj studentoj laboris super tradukiloj inter la tataro kaj la kazaĥa, la keĉua kaj la hispana, la indonezia kaj la malaja, la malta kaj la hebrea kaj la slovena kaj la kroata. Studento kiu volus plibonigi la kvaliton de la tradukoj de Esperanto al la angla estus ankaŭ bonvena.

Interesitoj pri la evoluigo de Esperanto-tradukiloj bv. kontakti Hektor Alos i Font (hectoralos@gmail.com) aŭ Jacob Nordfalk (jacob.nordfalk@gmail.com) laŭeble frue. Vi povas kontakti nin ankaŭ se vi interesiĝas pri la evoluigo de aŭtomata tradukilo por malpli uzata lingvo senrilata al Esperanto.

Hèctor Alòs i Font

PRINTEMPE EN BAASEM-DAHLEM

La ĉi-jara renkontiĝo PRINTEMPE okazos en Baasem-Dahlem, meze de la Eifel-regiono, ĉ. unu trajnhoron sudokcidente de Kolonjo. Jen la retejo, <http://www.esperantoland.org/printempe> kie eblas ankaŭ aliĝi.

Tiu tempo kongruas kun la belgaj lernejoj kaj ankaŭ kun la luksemburgiaj kaj multaj germanaj lernejoj, almenaŭ dum kelkaj tagoj. La ejo estas agrabla kaj oni povas bele superrigardi la valon; la ejo havas endoman naĝejon. Ĉirkaŭe eblas belaj promenoj kaj ekskursoj. Vidu la fotojn ĉe http://www.esperantoland.org/printempe2_bildoj/ Estos kelkaj prelegoj, amuziĝo en la endoma naĝejo, promenoj kaj ekskursoj al regionaj vidindaĵoj. Volonte ni ofertas lingvo-kursojn - laŭpete por komencantoj kaj progresantoj aŭ konversacio.

Lu Wunsch-Rollshoven

IBERIA RENKONTIĜO



La LKK de la 9-a Iberia Renkontiĝo kiu okazos inter la 15-a (ven.) kaj 17-a (dim.) de marto 2013 memorigas vin, ke vi povas aliĝi al la IR per nia nova retpaĝo <http://esperanto.es:8080/IberiaRenkontigho/> kaj ke estas rabatoj por homoj pli junaj ol 30 jaroj.

Ni esperas vidi vin tie!!

LKK de la 9a Iberia Renkontiĝo
IroMadrado2013@gmail.com

SOMERA PROGRAMO DE ESPERANTO-KASTELO GREZILJONO



Staĝo PRINTEMPaS

2013-apr-20/27: intensivaj kursoj kun Christophe Chazarein el Okcitanujo kaj Stefan MacGill el Hungarujo.

2013-apr-27/ tuttage: internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1)

2013-apr-27/maj-01: seminario pri inturkultura komunikado kun Radojica Petrović el Serbujo

=> informoj rete en =>

gresillon.org/printempo

Laŭtema SOMERA programo

Restadu unu tagnokton, ĝuu 7 tagojn aŭ feriu dum ĝis 5 semajnoj !

2013-jul-06/13: Turisma semajno kun tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro

2013-jul-13/20: Art-amatora semajno por ŝatantoj de teatro, dancado, kantado, muziko kaj grafika arto

2013-jul-20/27: Alternativa MOJOSejo, semajno pri alternativaj temoj kaj por junuloj kun Ŝtonĉjo kaj Libnjo

2013-jul-27/aŭg-03: Renkonto de Esperanto-Familioj, 35a REF

2013-aŭg-03/10: Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj eĉ kun beboj kaj geavoj

2013-aŭg-10/17: Teatra aktora Semajno, aktora kurso kun Saŝa Pilipoviĉ, surscenigo de farso kun Georgo Handzilk

Informoj rete en gresillon.org/somero

Adreso: Maison Culturelle de l'Espéranto, Château de Grésillon, St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU, France

Telefono: [+33-2.41.89.10.34](tel:+33-2.41.89.10.34), retadreso: kastelo@gresillon.org, retejo www.gresillon.org

Bert Schumann

PUBLIKA PREZENTO DE LA LIBRO “NA ZEIS ZE KAPABI”

En Ateno la 27-an de februaro 2013 nia samideanino Mantha Hristu en la ĉeesto de preskaŭ 100 personoj, prezentis sian helenan tradukon de la vaste konata verko de profesoro Eugène de Zilah, “Vivi sur barko”.

Je la fino, Kostas Kiriakos prezentis, per bildoj kaj filmetoj, la nuntempan internacian esperantan agadon kaj donis intervjuon en la ŝtata televidstacio (NET) pri la solvo de la lingva problemo de Eŭropa Unio pere de Esperanto.

Kostas Kiriakos

80-a ITALA E-KONGRESO 2013

Multaj el vi jam konas la etoson de nia kongreso plenplena je seminarioj, prelegoj, kursoj, ekskursoj. Nia kongreso estos ferio en belega loko apud la maro kaj la montaro kun ebleco resti en la kogresejo pro la programo kaj bani en la naĝejo aŭ ĉe la maro. La suno kaj la maro estas senpagaj ĉeestantoj en tiu periodo en tiu parto de Italio, la tiel nomata "lazura marbordo" inter Ĝenovo kaj Francio. Vi devas nur kunporti vian naĝkostumon. Ĝi okazos en Castellaro

apud San Remo de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2013. Prelegos interalie: Humphrey Tonkin kaj Paul Gubbins.

La tutan programon, aliĝilon, informojn pri loĝdo, ktp. Vi trovos ĉe: kongreso.esperanto.it
Kontaktu:Laura Brazzabeni, laura.brazzabeni@alice.it

HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

Pri la hispana E-kongreso, kiu okazos en Zaragoza de la 3-a ĝis la 5-a de majo vi trovos detalojn ĉi tie: [HISPANA ESPERANTA KONGRESO 2013](http://www.hispana-esperanto-kongreso.org)

Provizoran programon vi trovos ĉi tie:

<https://sites.google.com/site/zaragozafrateco/2013-hek/provizora-progra>

Darío Rodriguez

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 28-an de februaro 2013

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Tõnu Hirsik, Jozef Reinart, Peter Balaž, Edward Kozyra, Zlatko Tišljár, Hèctor Alòs i Font, Bert Schumann, Lu Wunsch-Rollshoven, Kostas Kiriakos, Laura Brazzabeni kaj Darío Rodriguez.

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

